

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. II N-RO 4
APR. 1951

人民中國報道

EN TIU ĜI NUMERO:

Koreoj de Ĉinio

Nova Epoko en Sinkiang

Labor-asekuro de Popola Ĉinio

Scienco al la Popolo

Feliĉo

La lasta
ludo de
Marioneto

ANTAŬMORTA FRENEZIĜO de la INVADANTOJ

Post sinsekvaj pezaj malvenkoj en la maljusta invadmilito kontraŭ Koreio, la Usonaj invadantoj des pli frenezigiĝis en siaj barbaraj, brutaj agoj kaj senhontaj fanfaronoj. Ili ne nur pli brute dezertigis la urbojn kaj vilaĝojn kaj buĉis la pacajn civitanojn, sed kolerinte pro honto de malsukceso uzis asfiksian venengason kontraŭ la porpacaj kaj kontraŭinvadaj batalantoj. Ili ne nur senhonte mensogis kaj neis sian krimon uzi venenan gason, sed MacArthur, la ĉefkrimulo en la invado kontraŭ Koreio, eĉ freneze minacis la ĉinan popolon per atako al la Ĉina Popola Respubliko.

La Usonaj invadaj trupoj foje uzis gas-obusojn en la 23a kaj 26a de februaro kaj la 3a kaj 6a de marto sur la Han-rivera fronto. La gasobusoj, post eksplodo, eligis helflavan aŭ nigran vaporon kiu odoris kiel jodo aŭ sulfuro. La viktimoj sentis kapturigojn, naŭzon kaj senfortecon, post kuracado ili bezonis 12 horojn por resaniĝi.


Kiel la proparolanto de la ĉinaj popoloj volontuloj diris, ĉi tiu serio da krimoj faritaj de la Usonaj invadantoj plene malkovras ilin kiel la plej brutan, barbaran armeon en la mondo kaj kiel murdistojn kiuj transprenis la heredaĵon de Hitleraj banditoj kaj japanaj faŝistoj.

Kiam la krimo de la Usonaj invadantoj en ripeta uzado de venengaso sur la Han-rivera fronto estis konatigita al la popolo de la mondo, oficistoj de MacArthur-a Stabejo kaj Stabejo de la Usona Ekstremorienta Aerforto, de MacArthura Stabejo kaj Stabejo de la Usona Ekstremorienta Aerforto, en la 5a de marto, senhonte neis la malhumanajn kaj kontraŭlegajn agojn kiujn ili faris.

La Usona neado de la krimo uzi venenan gason ne nur pruvas, kiel diris la proparolanto de la ĉinaj popoloj volontuloj, ke la Usonaj agresantoj estas buĉistoj kun sangmakulitaj manoj, sed ĝi estas alia pruvo ke ili estas senhontaj mensogantoj. Estas bone konate ke la Usona Registaro kaj militaj aŭtoritatoj faris provokajn agojn enstrudigi en la aeron de Nordorienta Ĉinio kaj bombadi kaj maŝinpafadi kaj kontraŭlegajn agojn babilaco. Sed nenia mensogo povas kovri la faktojn.

En la 24a de marto, MacArthur faris deklaron kiu estas insulto al la ĉina kaj korea popoloj. Li aragante postulis la ĉinajn volontulojn kaj Korean Popolan Armeon konduki intertraktadon kun li kaj submetigi al Usona agreso. Li minacis la ĉinan popolon per atako de Usonaj kaj Britiaj invadaj trupoj al la Ĉina Popola Respubliko. Kiel la Kuna Deklaracio de diversaj demokratiaj partioj en Ĉinio, publikigita en la 4a de movembro, 1950, diris: "Ĝuste kiel la japanaj imperiistoj en la pasinteco, nun Usono invadas Koreion ne por Koreio mem, sed por invadi Ĉinion." Kvankam la superaj personoj en la Usona Registaro, kiel Truman, Acheson, kaj similaj, provis kovri la esencon de la Usona agresa intrigo, la masko estis komplete forŝirita de la MacArthur-a deklaro en la 24a de marto.

La bruta buĉado, uzado de venengaso, senhonta fanfaronado kaj aroganta minacado fare de la invadantoj klare elmontras, ĝis kia grado la Usonaj agresantoj frenezigiĝis. Sed la buĉado, la venenado, la fanfaronado kaj minacado



nur plie incitos la indignon de la ĉina popolo kaj plifortigos iliajn vigilancon kaj decidemon rezisti Usonon kaj helpi Koreion.

La Usonaj agresantoj suferis severajn malvenkojn kaj perdis cent mil homojn en la korea Milito kaj estas kondamnitaj al komplete malsukceso, el kiu nenia malhumana buĉado aŭ venenado, senhonta mensogado aŭ fanfaronado povos ilin savi. La ĉina popolo kaj la korea popolo estas sufiĉe fortaj por komplete venki la Usonajn agresantojn kaj liberigi Koreion. Ĉi tiu forto ne povas esti malhelpata per aeroplana aŭ militŝipa supereco. Dum la ok jaroj da Kontraŭjapania Milito, la ĉina popolo havis nek aeran nek maran superecon sed ili venkis la japanajn agresantojn. Dum la Popola Liberiga Milito, la ĉina popolo sen aera aŭ mara supereco, ankaŭ venkis la Kuomintangajn reakciulojn subtenatajn de la Usonaj imperiistoj. La ĉina popolo povis venki la japanajn imperiistojn kaj Kuomintangajn reakciulojn en la pasinteco, kaj nun batalante kune kun la korea popolo sendube povos venki la Usonajn agresantojn. La altgrada frenezigo de la Usonaj agresantoj en bruta buĉado, uzado de venena gaso, senhonta mensogo kaj aroganta fanfaronado tute ne pruvas ilian fortecon, sed nur malfortecon kaj senesperan baraktadon kaj frenezigon antaŭ la ne evitebla morto.

ĈINAJ ESPERANTISTOJ PROTESTAS KONTRAŬ LA PERSEKUTO DE FRANCA REGISTARO AL LA PACBATALANTOJ

La Ĉina Esperanto-Ligo lastatempe deklaras sian proteston kontraŭ la malpermeso de franca registaro pri agadoj de la Monda Pac-Konsilo en Francio. La deklaro tekstas jene:

Post la malpermeso pri agadoj de la Monda Federacio de la Sindikatoj, La Virina Internacia Demokrata Federacio kaj La Monda Federacio de Demokrata Junularo en Francio, la franca registaro nun denove malpermesas la agadon de la Monda Pac-Konsilo. Tia politiko rekte kontraŭ la franca demokratia tradicio plene elmontras, ke la franca registaro voluntas esti lakeo de la Usonaj imperiistoj kaj la malamiko de la tutmondaj pacamaj popoloj spite la volon de la franca popolo. Ni, tutĉiniaj esperantistoj, firme protestas tian reakcian politikon de la franca registaro kaj decidis antaŭenpuŝi pluen la patriotisman movadon anti-usonan kaj por-koreian por defendi la mondpacon unuigante kun la tutmondaj popoloj.

La Koreoj de Ĉinio

Ling Fang (凌方)

La pli ol 1,200,000 koreoj nun loĝantaj en Nordorienta Ĉinio havas la samajn rajtojn, devojn kaj privilegiojn kiel ĉiuj aliaj civitanoj de la multaj nacioj kiuj formas la Popolan Respublikon de Ĉinio.

Norden pelite de terura malsatego, la koreaj kamparanoj komencis sian unuan grandskalan migradon en Nordorientan Ĉinion dum la oka jardeko de la lasta jarcento. Tiuj enmigrintoj unue enloĝiĝis en Hunĉun (環春), kaj pliposte en Vangĉing (汪清) Jenki (延吉) kaj Holung (和龍), ĉiuj en Kirin-Provinco. Jen en 1910 Koreoj estis aneksita de la japanaj imperiistoj, kaj dum la sekvantaj tri jardekoj, pli ol unu miliono da koreoj estis devigitaj forlasi sian patrolandon kaj iri al la Nordoriento de Ĉinio. Oni kalkulis ke je la tempo de japana submetiĝo en 1945, preskaŭ 2,000,000 koreoj estis loĝantaj en Nordoriento.

La krueleco de la japanaj imperiistoj al la korea popolo estas fame konata. Ilia abomeninda reĝimo de rabado kaj subpremado kaj la uzurpado de korea tero fare de la japanaj koloniistoj devigis pli da koreoj forkuri trans la Tumen- kaj Jalu-riverojn en Ĉinio. Montriĝas nun ke ĉi tiu politiko "translokigi koreojn al Manĉurio kaj japanojn al Korejo" estis parto de la zorgeme ellaborita japana plano por konkuri la ĉefteron de Azio.

Dum jarcentoj Ĉinio kaj Korejo jam ĝuis la amikajn interrilatojn gravajn por du popoloj kun komuna landlimo ĉirkaŭ 500 kilometrojn longa sur la Tumen- kaj Jalu-riveroj. Sed de post 1910 la ligo inter la du popoloj estis multe pli-fortigita en ilia lukto kontraŭ la komuna malamiko—japana imperiismo.

La korea popolo estis neniam subigita de la japanaj imperiistoj. Spite grandan riskon kaj kun heroa kuraĝo, koreaj patriotoj rezistis Japanion senĉese dum la tutaj 36 jaroj de japana okupado de ilia patrolando.

Post la japana invado en la Nordorionto de Ĉinio je 18, sept. 1931, la koreoj kaj ĉinoj bataladis ŝultro ĉe ŝultro kontraŭ la japanan invadantojn. En jan. 1936, sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio, la Anti-Japana Unuigita Demokrata Armeo (AJUDA) estis organizita en Nordorienta Ĉinio. Ĉinaj kaj koreaj batalantoj formis la Unuan, Duan kaj Trian Armeojn de la AJUDA, kiu disvolviĝis en distriktoj loĝataj pleje de koreoj. Por la kamparanoj en tiuj regionoj, neniu ofero estis tro, granda por subteni iliajn armeojn, ĉar ili bone sciis ke povos esti neniam feliĉo, sed nur sklaveco, se la japanaj imperiistoj restos tie.

En aŭg., 1945, la Sovetunia armeo helpata de la armitaj unuoj de la ĉina kaj korea popoloj, liberigis la tutan Nordorientan Ĉinion kaj Nordan Koreion, de la japanaj invadantoj kaj iliaj pupoj. De 1945 ĝis 1948, pli ol 50,000 koreoj de Nordorienta Ĉinio memvole enskribis sin en la Ĉinan Popolan Liberigan Armeon kaj ili batalis tra la tuta milito de la Nordoriento ĝis Hainan-Insulo (海南島). La koreaj popoloj loĝantaj interne de la landlimoj de Ĉinio ja ludis gloran parton

en la Anti-japana Milito kaj la Liberiga Milito de la ĉina popolo.

Dum la postmilitaj jaroj, multaj koreoj revenis al sia libera patrolando. Sed tiuj kiuj preferis resti en Nordorienta Ĉinio nombris pli ol 1,200,000. La liberigo alportis al ili novan vivon. La loka administra potenco estas en iliaj propraj manoj kie la loĝantaro konsistas nur el koreoj, kaj en distriktoj kie ili formas minoritajn grupojn, ili havas propojciajn reprezentantojn en la lokaj registaroj. Ili entuziasme partoprenis en la agrara reformo. Nuntempe ili estas ne plu "fremdlandaj enmigrintoj," sed ĉinaj civitanoj kun plenaj rajtoj. Ili estas ne plu ekspluatitaj sklavkampuloj de la japanaj koloniigaj kompanioj, sed liberaj agro-posedantoj.

Politikaj Rajtoj

En sept., 1949, ili sendis siajn reprezentantojn al la Unua Plena Sesio* de la Ĉina Popola Politika Konsiliga Konferenco kiu fondis la Popolan Respublikon de Ĉinio. Iliaj delegitoj servas en la Komitato de Naciaj Aferoj, ambaŭ en la centra kaj regionaj organizoj. Troviĝas nun miloj da aktivaj kaj respondecaj kadroj koreaj laborantaj en vilaĝoj, fabrikoj kaj lernejoj. Ĝis junio, 1950, pli ol 6,200 novaj koreaj kadroj jam partoprenis la unuan fojon en la administra kaj produkta laboro, kompletiginte sian regulan lernadon aŭ ricevinte specialan irenadon en mallongaj kursoj.

Konate kiel diligenta kaj penema popolo, la koreaj terkulturistoj kulturis kaj pligrandigis multajn jaroj vastajn pecojn da nekulturita tero en la Nordoriento. Sed sub la japana regado ĉirkaŭ 90 procentoj el ili estis senteraj. La grandaj koloniigaj kompanioj fonditaj de la japanaj imperiistoj kaj la lokaj feŭdaj bienuloj ekspluatis ilin ĝisoste per ekscesaj rentoj, impostoj kaj aliaj formoj de rekta kaj malrekta rabado.

Nur kiam la agrara reformo estis plenumita post la venko super Japanio, ili ricevis justan kaj egalan traktadon. Agroj, brutoj, agrokulturaj instrumentoj, domoj kaj aliaj posedaĵoj konfiskitaj de la imperiistoj kaj feŭdaj bienuloj estis al ili disdonitaj. Ekzemple, en la gubernio Jenŝou (延壽) en Kirin-Provinco, el la 59,120 muoj kulturataj de 2,275 familioj de koreoj antaŭ la liberigo, nur 4,500 muoj apartenis al tiuj familioj. Post la agrara reformo, la restantaj 1,956 familioj (ĉar multaj jam revenis al Korejo post la japana submetiĝo) akiris 71,570 muojn da tero.

La japanaj imperiistoj estis senkompataj politike, ekonomie kaj kulture egale. La uzo de la korea lingvo estis malpermesita al la koreoj de Nordorienta Ĉinio. Neniu lernejo estis provizita por ili. Ĉio ĉi tio estis radikale ŝanĝita de la liberigo. Kulturaj kaj edukaj agadoj en la korea lingvo estis kuragigitaj kaj rapide vigliĝis. Grandaj nombroj da instruistoj estis trejnataj kaj la edukaj normoj estas altigitaj konforme. Novaj lernejoj estas malfermitaj. En la Jenpjen-regiono (延邊區) kie troviĝas la plej granda koncentriĝo de 647,000 koreaj popolanoj, nun troviĝas

331 elementaj lernejoj, 25 mezgradaj lernejoj, kaj unu universitato—meznombro unu elementa lernejo en ĉiu vilaĝo kaj kvin mezgradaj lernejoj por ĉiu gubernio. La lernolibroj estas en la korea lingvo.

Kulturaj Disvolviĝoj

Laŭ la lastatempaj statistikoj, pli ol 200,000 lernantoj koreaj en la Nordoriento nun studas en 1,500 elementaj lernejoj, 70 mezgradaj lernejoj, kvar instruistaj lernejoj kaj la universitato. Tiuj ciferoj donas klaran bildon de la rapideco de la nenigo de analfabeteco kaj la disvolvigo de la kulturaj heredaĵoj de la koreoj en Nova Ĉinio.

La eldona kvanto de korelingvaj tagjurnaloj—la *Korea Popola Tagjurnalo* kaj la *Laboristoj kaj Kam-*

paranoj—en la Nordoriento sumiĝas je 45,000 ekzempleroj. Proksimume duonmiliono da ekzempleroj de libroj en la korea lingvo estis presita dum la pasintaj tri jaroj.

Liberigo alportis novan kaj pliriĝitan vivon al la koreoj en Ĉinio. Kune kun ĉiuj aliaj popoloj loĝantaj interne de la landlimoj de Ĉinio, ili deziras pacon por plifirmigi kaj plidivolvi siajn akiraĵojn. Sed la avidaj manoj de la Usonaj imperiistoj estas minacantaj ilian noveakiritan liberecon. Jen estas la kaŭzo kial ili marŝis, kune kun miloj kaj miloj da siaj ĉinaj fratoj, trans la Jalu-rivero kiel volontuloj por haltigi la novajn agresantojn.

Trad. N.J.L.

*kunsido, periodo de kunsido.

KLARA VOJO POR LA PLUA DISFLORIĜO DE ĈINA E-MOVADO

En la epoko de Granda Maŭ Ze-tung kaj sub la gvido de la Ĉina Popola Registaro komenciĝas tute nova epoko por la Esperanto-movado en Ĉinio. Tion plene montras la plena sukceso de la senprecedenca tutlanda fonda kongreso de ĉinaj esperantistoj, pri kiu ni raportis en la lasta numero. La kongreso faris gravan deklaron, kies enhavon ni resumas jene. La plena teksto aperos en speciala numero de Popola Mondo, la organo de Ĉina Esperanto-Ligo.

En la unuaj paragrafoj la deklaro klare elmontras kaj kritikis la utopian pacifismon de etburĝoj en la komenco de ĉina esperanta movado, kaj aliflanke estas agnoskita certa rolo de Esperanto en revolucio.

Speciale akcentita estas la bezono de Esperanto en la nuna tempo, kiam la ĉina popolo triumfe fondis kaj firmigis sian propran reĝimon renversinte la reaktician reĝimon de Ĉiang Kai-ŝek armitan de Usonaj imperiistoj, kiam necesegaj pli intima interrilatiĝo kun la tutmonda progresema esperantistaro.

Ĉe la fino la deklaro klare difinas la taskon de la ĉinaj esperantistoj en tri punktoj:

1) Unuigi per Esperanto ĉiujn pacajn kaj demokratiajn fortojn de la mondo por subteni la alvokon kaj rezolucion de la Monda Pac-Kongreso kaj Monda Pac-Konsilo por la defendo de mondpaĉo; kontraŭstari la agreson kaj frenezajn militpreparadon de la imperiista tendaro estrata de Usonaj imperiistoj; kaj frakasi ĝian pormilitan propagadon, partopreni en la movado "rezisti Usonon kaj helpi Koreion," kontraŭstari la intrigon rearmigi Japanion kaj fari kun ĝi apartan packontrakton sen la partopreno de Ĉinio kaj Sovetunio. Raporti per Esperanto al la tutmondaj popoloj la spertojn de ĉina novdemokratia revolucio kaj la fakton de la konstruado de nova Ĉinio...

2) Kritiki la superklasan idealisman vidpunkton de la t.n. "homarismo" en la Esperanto-movado, firme kontraŭstari la "sennaciismon"

我這是一句話：世界是
在進步，而我們必須正視
世界之進步，革命之必要，
那末，世界是我們的，
世界是我們的，世界是我們的。

Supre estas la skribaĵo de Prezidanto Maŭ Ze-tung por "Jen-an Esperantisto" en dec., 1939. Ĝi legiĝas jene:

MI ankoraŭ tiel opinias, ke Esperanto estas lerninda kaj lernenda, se oni ĝin uzas por vera internaciismo kaj revolucio.

utiligeblan nur de la imperiistoj kaj interligi internaciismon kaj patriotismon kaj fari ilin la enhavo de Esperanto-movado. Ĉar la faktaj pruvaj, diras la deklaro, ke nur en socialisma kaj novdemokratiaj landoj efektiviĝas la idealo de esperantistoj—vera egaleco, amikeco kaj justeco inter ĉiuj nacioj kaj ke nur firma batalo kontraŭ la agreso de imperiistoj povas plej efike defendi la mondpacon, kiun la esperantistoj arde amas.

3) Per organizado, propagando, edukado kaj eldonado grandnombre trejni entuziasmajn kaj kapablajn esperantistajn batalantojn por la tutmondaj paco kaj demokratiaj.

La unuan fojon la ĉinaj esperantistoj organiziĝas en tutlanda organo kaj la unuan fojon ili povas libere agadi kaj publike deklari sian programon de agado. Tiu ĉi programo sendube garantios la pluan disfloriĝon kaj riĉajn fruktojn de iliaj esperantaj laboroj. Ĉar vojo ĝusta ĉiam kondukas al triumfo.



Nova kaj prospera epoko kiun la popolamaso aludas kiel la "epoko de Maŭ Ze-tung," rapide ŝanĝas la vastan sed maldense loĝatan areon de la provinco Sinkiang (新疆), kiu ampleksas ĉirkaŭ sesonon de tuta Ĉinio, konsistente, krom la granda dezerto Gobi (戈壁) kaj la neĝokovrita monteteno Tienshan (天山), el vastaj herbejoj kaj abundaj or- kaj olekampoj.

En la provinco, nutraĵo estas plimulte produktata je 20-30% ol antaŭ unu jaro, kaj la komercado kun Sovetunio ankaŭ estas kreskanta.

La kamparanoj, al kiuj tero kaj akvo estas vivfonto, tamen suferis en la pasinteco akutan mankon de ambaŭ. Nun dank' al la helpo de la registaro, virga tero estas ekkulturita kaj mono kaj semoj pruntedonitaj al la kamparanoj.

La antaŭaj ter-soifantaj kaj ekspluatataj kamparanoj ankaŭ suferis pro manko de ŝarĝbestoj. La registaro kaj kamparanoj asocioj, kiuj tuj post liberigo starigis, helpis per organizado de interhelpaj teamoj. Ŝarĝbestoj kaj agrikulturaj instrumentoj estis provizitaj. En nur unu distrikto sude de Tienshan 150 tiaj teamoj estas funkciantaj. Tiu ĉi sistemo ne nur liberigas kromajn produktajn fortojn kiuj estus alie katenitaj, sed ankaŭ pretigas ne-

Nova Epoko en Sinkiang

cesajn kondiĉojn por enkonduki plibonigitajn agrikulturajn metodojn.

Akvo por irigacio kaj brutaro ĉiam estas grava problemo en Sinkiang. Pluvo estas malofta kaj plejparte de la akvo devenas de degelanta neĝo sur la montoj, kaj enfluas en la fojdemarajn riveretojn. La akvo estis tie monopolgata de bienuloj kaj kamparaj despotoj kiuj faris barierojn kaj fluejojn kondukantajn al iliaj kampoj por forŝifoni plejparton de la akvo. Tiel la kamparanoj por sia farmado kaj trinkado devis aĉeti akvon de la bienuloj.

Lastan jaron, granda akvo-konserva projekto estis komencita. La tuta longeco de la miloj da irigaciaj kanaloj kaj kanalbranĉoj, novaj kaj riparitaj, estis 650 km. En Kulĝuo (庫爾楚) ĉirkaŭ 200,000 popolanoj partoprenis la laboron por 863 kanaloj kaj branĉoj. Tio ĉi ankoraŭ estas kompare malgranda projekto.

La Akvokonserva Buroo de Sinkiang faris planon konstrui nombron de akvujoj por deteni la akvon de perdiso en Gobi kaj duonsekaj dezertoj. Apud Tihua (迪化) la Hungjen-Akvujo (紅雁著水池) nun estas en konstruo, kaj parto finita komencis jam funkciadon. La tuta akvujo, kiam kompletigita, konservas 500,000 kubmetrojn da akvo.

Plimulta akvo signifas plimultan agron kaj pliriĉajn rikoltojn. Krom akvumi iliajn kulturajn kampojn tio ankaŭ instigas pli grandskalan plugadon de virga tero. En suda Sinkiang ĉirkaŭ 20,000 hektaroj estas plugitaj kaj kulturataj.

La rezultoj estas mirigaj. Krom la plimultigo de nutraĵprodukto la kvalito de la rikoltaĵoj ankaŭ pliboniĝis per la adopto de reformitaj metodoj kaj pli bonaj semoj.

Nun estas kulturataj Ukraina tritiko, produktanta pli ol 2,000 kg. po hektaro, kotono maturiganta en 110 tagoj, citroloj pezantaj 35 kg. kaj akvomelono 26 kg.

La efekto de plimultigo de produkto estas klare videbla en Vuĉio (烏什) apud la Sovetia Socialistika Respubliko de Kirgizo. Antaŭ la liberigo en Vuĉio oni devis transporti mangajon el Kaŝgaro (喀什葛爾) kaj multaj el la loĝantoj devis forlasi siajn hejmojn por serĉi laboron aliloke. Sed en la lasta jaro la kvanto de enportita nutraĵo malpliigis je 80% kaj pli ol 2,000 loĝantoj

revenis hejmurbon de aliaj partoj de la provinco.

La senlimaj ebenaĵoj kaj herbejoj estas la plej bonaj paŝtejoj. Sed la sorto de la dombestobredistoj, plej multe hazokaj kaj mongoloj estis tiel malbonaj kiel tiu de la kamparanoj antaŭ la liberigo. Malsano ĉiaŭ atakis kaj multe forrabis la vivojn de ambaŭ homoj kaj bestoj. La ĉesigo de komercado kun Sovetunio la plej natura merkato, farita de la Kuomintang-reĝimo, lasis al la paŝta lando nenian stimulon por reformo kaj kresko.

Tiu ĉi situacio post la liberigo tuj radikale ŝanĝiĝis. Komercado kun Sovetunio jam rekomenciĝis. Pro la pligranda merkato, la prezo de la produktoj kiel lano, ledo, ŝafidelo estas racie reĝustigitaj de la antaŭaj arbitre malaltaj niveloj. La prezo de ŝafidelo, ekzemple, plialtiĝis kvinoble kaj tiu de lano trioble.

Aliaj penoj de la registaro por plibonigi la vivadon de la loĝantoj en la lasta jaro, inkluzivis la plibonigon de la bredado de diversaj dombestoj. Por kontraŭbatali malsanojn, laboratorioj por produkti serumon, kaj 10 veterinaraj centroj estas jam fonditaj.

Je la fino de la unua jaro sub la popola regado, la rezultato akirita dum mallonga tempo estas klare

videbla en la plibonaj vestoj portataj de la popolanoj. Kamparanoj kaj paŝtistoj, kiuj antaŭe estis cifonuloj, nun povas aĉeti novajn vestojn por si kaj siaj familianoj. Novaj loĝejoj ekanstataŭas la kadukajn, kaj industria disvolviĝo donas plimultajn okazojn por laborado.

Ĉio ĉi tio estas nur en la fino de la unua jaro de la nova epoko. La popolo de la provinco, tiel multe plibonigite sian sorton, kredeble laboros kun sia tuta energio kaj kreskanta entuziasmo, en la dua jaro por plifeliĉigi sian vivon.

Nash



Knabino de Sinkiang-Provinco

En la Hospitalo de Ĉinaj Volontuloj

Paj Hua (白桦)

Plenumante la komision de nia popolo, ni veturis pli ol mil mejlojn en 20 tagoj, vizitante kaj konsolante ĉiujn kamaradojn kaj batalantojn en la hospitaloj de la ĉinaj volontuloj.

Tiuj herooj de la popolo donis al mi du fortajn impresojn: unue, por la sekureco de nia patrolando kaj por la feliĉo de nia popolo ili surŝultrigis ĉiujn malfacilaĵojn kaj suferojn, eĉ verŝis sian sangon; due, kvankam ili estis korpe vunditaj aŭ malsanaj, tamen ili montris grandan energion kaj feran volon kvazaŭ ili estus en la antaŭvespero de granda batalo sed ne en la hospitaloj. Ili babilis kaj babiladis senlace. Ili rakontis ekscite la fabelsimilajn kaj prikantindajn heroojn en la ŝultro-ĉe-ŝultro batalo de la ĉinaj kaj koreaj batalantoj. Ili parolis pri la panika fuĝo kaj kapitulacio de Usonaj invad-armeoj tuj post la aŭdiĝo de la eksplodo de niaj manganadaj. Dum la rakontado ili eĉ ofte tion ilustris per imitado de la konfuzitaj malamikoj. Tio kaŭzis eksplodon de ridegoj inter la aŭskultantoj.

Ilin plej interesas novaĵoj el la fronto. Kvankam ripozante en la hospitaloj, la bravuloj ja zorgas pri ĉio en la batal-kampoj. Ili diris: "La vivo ĉe la fronto estas multe pli malfacila kompare kun la nia. Ni ja vivas tro komferte en la post-fronto. Ankaŭ la korea popolo vivas tre mizeran vivon sub la tretado de Usonaj imperiistoj."

"Estu modela batalanto sur la fronto kaj modela ripozanto malantaŭ la fronto." Jen estas la devizo de la vunditoj mem. Ĉiu el la vunditaj aŭ malsanaj batalantoj en diversaj hospitaloj esprimis sur papere kolektive aŭ individue sian decidon ripozi pacience. Ili scias ke

nur pacienca ripozo povas garantii la fruan resanigon kaj sekve fruan reiron al la fronto por batali kun renovigita energio. En la hospitalo la ripozantoj skribis: unue, ni ripozu pacience, sekvu la konsilojn de la kuracistoj kaj reiru al la fronto tuj post resaniĝo; due ni ne ĉesigu la lernadon dum la ripozado, bone redaktu nian murgazeton kaj neniigu analfabetojn; trie, ni unuigu kaj interhelpu dum la ripozado.

Ili organiziĝis en grupojn de lernado, ĵurnallegado kaj redaktas murgazeton. Sur ĉies lito aŭ tablo sin trovis ilustritaj gazetoj aŭ literaturaj verkoj. Ĉiang Lian-seng (蔣連升) kaj Ĉaŭ Hu-ĉen (趙虎臣) restis en la hospitalo nur malpli ol unu monaton sed ili jam scipovis legi 200 novajn ideografiojn. Iuj el ili eĉ komencis lerni la korean lingvon. La nigratabula ĵurnalo pruvigis bona ilo por antaŭenpuŝi lernadon kaj disvolvi kritikadon kaj estis ĉiam plenkonaĵo de artikoloj. Ili ankaŭ emetis bildojn kaj librojn en "konsol-saketojn" por ke la kamaradoj grave vunditaj povu ilin legi kaj ŝui. Ili rigardis la ripoz-tempon ŝanco por lernado kaj la hospitalon sia lernejo.

Ĉiuj medicinaj laborantoj montris alt-gradan spiriton de revolucia humanismo, farante ĉion eblan por resanigi kiel eble plej frue la vunditojn. Ili laboris en plej granda streĉeco. Ĉiu kuracisto prizorgis meznombro 60 ĝis 80 vunditojn kaj ĉiu flegistino aŭ helpa fleganto priatentis 20 ĝis 30 vunditojn. Antaŭ tiu ĉi grava tasko, ili manifestis sindonemon en sia laboro. Iufoje 80% de la laborantoj de la 1-a medicina grupo de la hospitalo suferis de malvarmumo sed neniu el ili ripozis. En la hospitalo kelkaj el la

flegistoj, plejparte kamaradinoj, svenis pro ekstrema lacigo. Li Ming-tung (李明童), lernanto kuracisto en la menciita hospitalo falis svene iunokte ekster la malsanulĉambro kaj li estis trovita nur kiam iu vundito ellitiĝis kaj iris al la necesejo. Liu Ĉing-je (劉靜業) flegis 53 personojn kaj banis ĉiun el ili 4-foje en 3 semajnoj. Li ankaŭ inventis la metodon de varmig-kurado per hejtigita briko anstataŭ varma-akva saketo. Vang Jing-hua (王英華) kaj aliaj ofte lavis la medicinajn instrumentojn ĝis profunda nokto malgraŭ haftendado kaj eĉ sangado de siaj manoj.

Ĉiuj vunditoj kortuŝiĝis pro la diligenteo kaj entuziasmo de la medicinaj laborantoj en kuracado kaj flegado. Al la flegistaro la vunditoj de la hospitalo donacis silkan standardon kun surskribo: "Patrino flegado." Kaj la 4a grupo prezentis al la laborantoj silkan standardon kun la vortoj: "Modela amo al vunditoj."

La sublima spirito de patriotismo kaj internacismo montrita de la batalantoj-herooj gajnis senkompardon respekton kaj amon de vastaj popolamasoj. Antaŭ la alveno de la vunditoj la loĝantoj kiuj loĝas proksime de la hospitaloj ekokupiĝis pri la pretigo de ĉambroj, hejtigo de

fornoj kaj arango de litoj. Kiam la vunditoj estis alvenantaj, la laborantoj de la lokaj registaroj kaj organizoj kune kun la popolamasoj portis brankardojn kaj prezentis ĉiuspecajn donacojn por bonveniĝi ilin. Kiam la vunditoj estis lokitaj en la varmajn ĉambrojn de la hospitaloj, la demetitajn malpurajn vestojn oni tuj forportis kaj lavis. La popolanoj alsendis diversajn necesojn kaj abundajn manĝaĵojn. La voluntula sang-ofera grupo ankaŭ rapidis al la hospitalo kaj ĉiu el ili postulis ke li la unua sangon oferu por savi la heroojn de la popolo. 47 anoj de la sang-ofera grupo donis unufoje pli ol 4,000 kub-centimetrojn da sango kaj dank' al tio pli ol 30 batalantoj grave vunditaj estis savitaj.

Speciale menciindaj estis la vironoj kiuj kvazaŭ patrinaj malkudris, lavis kaj rekudris por la vunditoj milojn da vestoj kaj litkovriloj en la plej malvarma sezono. En la loko kie troviĝis hospitalo por la volontuloj, la vironoj proprvole organizis lav-grupon. Ili eĉ konkuris pri la pureco kaj multeco de iliaj lavaĵoj. Tiu grupo malkudris kaj lavis entute pli ol 8,000 vatitajn vestojn, 1,500 sensubŝtofajn vestojn, 2,000 trikotajn kaj vatitajn litkovrilojn kaj ankaŭ faris pli ol 4,400 vestojn.

Esp-igis Mario Ĉou

LABOR-ASEKURO de POPOLA ĈINIO

La 1-an de marto ekfunkciis en tuta Ĉinio la Labor-Asekura Regularo (LAR) kiun publikigis la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro en februaro post pli ol dudekfoja plibonigado laŭ la opinio de la tutlandaj laboristoj. Tio ne nur felicigas la vivon de la ĉina laboristaro, sed ankaŭ alportos prosperon al la ĉina industrio, ĉar la liberigitaj laboristoj kun alta politika konscio ĉiam pli fervore laboras kaj produktas sentante, ke ili estas la veraj mastroj de sia patrolando.

Sub la reakcia regado de Kuomintang kaj la japanaj imperistoj, la ĉinaj laboristoj estis traktataj pli aĉe ol la ŝarĝbrutoj. La kruelaj ekspluatistoj neniam zorgis pri la higienaj kaj sekuraj kondiĉoj de la laborejoj kaj minejoj. "Ĉu la maŝinoj difektigis?" demandis la kapitalistoj kiam akcidento okazis; sed se centoj kaj miloj da laboristoj mortis en ŝaktoj kaj farbrikoj, ili neniam ĉagreniĝis pro tio, ĉar ili povis facile trovi anstataŭulojn. Iuj laboristinoj devis naski infanojn apud maŝino aŭ en laboreja necesejo dum aliaj estis forpelitaj el la laborejo, kiam ili ne povis plu laborigi pro alproksimiĝo de akuŝo. La entreprenoj akceptis nur la sanajn kaj fortajn el la laboristoj, kaj kiam ili estis vunditaj, malsanaj, aŭ maljunigitaj, ili estis elpelitaj sur la straton. Larmoj ofte plenigas la okulojn de laboristoj, kiam ili nun, ricevante helpon de la Labor-Asekura Fonduso (LAF), rememoras pri la mizeriga pasinteco.

Post la batalado de 30 jaroj sub la gvido de Prezidanto Maŭ kaj la Ĉina Komunista Partio, la ĉina laboristaro disrompis la katenon kaj sin liberigis el la sklava vivo. Ili fondis sian propran registaron, kiu ĉiam klopodas por la plibonigo de ilia vivstato. Jen la funkciigo de LAR estas plua pruvo pri la servopreteco de la Popola Registaro por la laboristaro.

Oni ja scias, ke ankaŭ en la kapitalistaj landoj ekzistas la t.n. Soci-Asekura Sistemo, sed tio celas nur narkoti la laboristaron, ke ili ne pikis kiam la kapitalistoj forprenas ilian muelon. De 1938 ĝis 1942 la Usonaj laboristoj pagis 4,300 milionojn da dolaroj al la asekura kaso, kiu elspezis nur 800 milionojn. Oni povas demandi: Kien iris la ceteraj 3,500 milionoj da dolaroj?!

Laŭ LAR de la Ĉina Popola Respubliko, kontribuon al la Labor-Asekura Fonduso oni pagos ĉiunmonate ne el la salajroj de la laboristoj, sed el la kaso de la entreprenoj ŝtataj aŭ privataj, kiuj havas cent aŭ pli ol cent laboristojn. La kontribua sumo al la fonduso egalas al 3 procentoj de la tuta sumo de la salajroj pagataj de la entreprenoj, kaj ĝi estas kontrolata de la sindikatoj—do de la laboristoj mem, kaj estas ĉiam je dispono por helpo al ili.

Laŭ LAR nun laboristinoj povas ricevi 56-tagan ripozon antaŭ kaj post akuŝo, plenan salajron kaj medicinajn helpojn de la entreprenoj. Laboristoj, kiuj vundigis dum laborado, povas ricevi plenan salajron dum tri monatoj, kaj tiuj kiuj vundigis ne pro laboro de la entreprenoj povas ricevi 50 ĝis 100 procentojn de sia salajro dum 3 monatoj

de LAF. Tiuj kiuj devas ripozi pro malsano de 3 ĝis 6 monatojn, povas ricevi de 30 ĝis 50 procentojn de sia salajro el LAF. Post ses monatoj ili povas ricevi pension por senkapabligitaj laboristoj.

Laboristoj kiuj senkapablighis rezulte de laborado povas ricevi ĉiunmonate de 60 ĝis 75 procentojn de sia salajro, kaj se ili perdis nur parton de sia laborkapablo, ili povas ricevi 5 ĝis 20 procentojn aldane al la salajro. Laboristo kripliginta pro neprofesia kaŭzo povas ricevi de 20 ĝis 30 procentojn de sia salajro de la fonduso.

60-jara laboristo laborinta 25 jarojn povas ricevi ĉiunmonate pension de 35 ĝis 60 procentoj de sia salajro kondiĉe ke li jam laboris 10 jarojn en la laborejo, el kiu li retiriĝas. 50-jara laboristino laborinta 20 jarojn povas ricevi la saman pension. Por tiuj kiuj laboras en ŝaktoj, hemifabrikoj ktp. aŭ en troa varmo aŭ malvarmo, la retiriĝa aĝo reduktiĝas je 5 jaroj. Kaj se ili volas daŭre labori en la entreprenoj, ili povas ricevi 10 ĝis 20 procentojn aldane al la salajro.

Funebra elspezo por laboristo, kies morton kaŭzas profesia okupo, estas pagata de la entreprenoj. La familianoj de la mortinta laboristo povas ricevi 25 ĝis 50 procentojn de lia salajro ĉiunmonate el LAF ĝis kiam ili kapablas sin vivteni. Tiuj de laboristo-mortintoj, kies morton kaŭzas ne profesia okupo, estas elprenataj el LAF, kaj la sumo egalas al meza salajro unumonata en la entreprenoj salajropagoj. Iliaj vivtenatoj povas ricevi de LAF pension sumigantan ĝis 12-monata salajro.

Por la labormodeloj, kaj batalheroj kiuj laboristigis, pli favoraj artikoloj enskribiĝis en la Labor-Asekura Regularo, kiuj certigas al ili privilegion por ĝui pli grandan helpon. LAR certigas helpojn ankaŭ al la laboristoj nesindikatanaj. Sed ne tiom multe kiom al la sindikatanoj.

La medicinaj elspezoj kaj salajropagoj donataj al la gelaboristoj pro malsano aŭ akuŝo estas rekte pagitaj de la entreprenoj, sed ne elprenitaj el la Fonduso. Kaj ne nur la laboristoj mem, sed ankaŭ iliaj familianoj povas ricevi medicinajn helpojn je la kosto de la entreprenaj kuracejoj.

Aldone al la ĉisupre menciitaj bonoj por la laboristoj, per la subteno de la Fonduso, fondiĝas centoj kaj miloj da kuracejoj, hospitaloj, sanatorioj, orfejoj, pensiulejoj, infanvartejoj, kriplulejoj ktp. por servi al la laboristaro. Kaj la minejoj, maŝinfabrikoj, fervojoj ktp. estas starigantaj sekurigajn sistemojn kaj plimultigitajn sekurigajn instalaĵojn sub la kontrolado de la sindikatoj. La laboristoj estas ĉie sub bona prizorgo.

Pro longdaŭra suferado kaj fi-traktado sub la reakcia regado de Kuomintang, la laboristoj eĉ ne kuraĝis tuj kredi al LAR je la komenco. Sed la sindikatoj organizis paroladajn kunvenojn, eldonis murgazetojn, aranĝis ekspoziciojn ktp. ĉie kie troviĝas labor-

Scienco al

"Sciencia scio estu dissemata inter la popolo," direktas la Komuna Programo de la Ĉina Popola Politika Konsilia Konferenco. Amo al scienco estas kuraĝigata kiel unu el la virtoj de civitanoj de la Popola Respubliko de Ĉinio.

Unuvorte, scienco kaj sciencistoj devas iri al la popolo. La nova demokratio, per sia sciencia, popola kaj nacia kulturo, atakas la ideologiajn fortikaĵojn de malluma reakcio. Tiu ĉi ideologia lukto prenas multajn formojn kaj batalos sur multaj frontoj. Unu el la plej gravaj estas la kampo de populara scienco.

En la unua monato de post sia fondiĝo, la Ministerio de Kulturaj Aferoj de la Popola Registaro jam establis Buroon por Dissemado de Sciencia Scio, direktata de Juan Han-ĉing (袁翰青), ĉina profesoro, kies plano por popularigo de scienco trovis neniam da subteno sub la reakcia Kuomintang-regimo. Nun, li havas la plenan apogon de la registaro, la sciencistoj, la amasaj organizoj kiel la sindikatoj, la organizoj de virinoj, junuloj kaj studentoj, la junaj pioniroj, popolaj kluboj, ceteraj demokratiaj grupoj kaj la Ĉina Komunista Partio, ĉiuj tiuj sin okupas per sciencia eduklaboro. "Malgraŭ ĉi tiu helpo, la tasko estas, tamen, ne facila. La Buroo devas kulturi preskaŭ virgan teron. Dum la pasinta jaro, 200 novaj libroj pri populara scienco kaj tekniko estis publikigitaj—tio estas egala al la tuta nombro da libroj pri

tiuj temoj troviĝintaj en Ĉinio ĝis la liberigo. Sciencistoj devas lerni skribi en populara maniero kaj konsideri la variajn bezonojn de la popolo. Ekzemple la Sciencia Eduka Buroo de la Kansu-Provinca Popola Registaro sendis kadrojn loĝi kun la kamparanoj, studi iliajn bezonojn en sciencia scio kaj ellaboris kun ili la plej bonajn rimedojn por lerni tion kion ili volas scii. La nova amasa gazeto "La Laboristo-Mehanikisto" kun eldonkvanto de 30,000 ekzempleroj—vasta laŭ la nuntempa nivelo—popularigas sciencan scion inter la laboristaro. La Buroo havas specialan informsektion por respondi la demandojn de la laboristoj.

Kiam la fundamentajn metodojn de popularigo oni ekmastris, la laboro de la Buroo komencis rapide iri antaŭen. Patronate rekte de la Buroo aŭ kunlaboro kun diversaj amasaj organizoj, 65 grandaj ekspozicioj pri diversaj sciencaj temoj estis aranĝitaj en ĉiu el la urbegoj dum pasinta jaro. Kvardek el tiuj sole allogis proksimume duonan milionon da vizitantoj. La 11 sciencaj centroj kaj 14 muzeoj kiuj antaŭe jam ekzistis sed preskaŭ mortis sub la Kuomintang-regado, nun revivigis kaj laboras tuttage por la amaso. Du tute novaj Popolaj Sciencaj Centroj establiĝis en Pekino kaj Ĉangŝa (長沙). Plue, popolaj kluboj, hospitaloj, lernejoj, universitatoj kaj ŝtataroj, okazigis kelkdek pli malgrandajn ekspoziciojn. Ekz., en Juce-Gubernio (榆次縣)

istaj amasoj por klarigi al ili kion LAR fakte liveros al ili. Granda laborfervoro kaj aplaŭdo levigis ĉe la laboristoj, tuj post kiam la vera signifo de LAR estis komprenita.


Maljuna teknikisto Ĉang Joŭ-ju (張友如) diris ridetante: "Mi ofte ĉagreniĝis de la penso: kion fari, se la filo ne volus subteni sian aĝan patron? Nun, post la apliko de LAR la fabriko fariĝas pli bona ol filo fidela!" 63-jara teknikisto Ĉaŭ Ĉun-tian (趙春田) de la 5a Maŝinfabrika de Mukdeno, kiu neniam bone zorgis pri la maŝinoj, nun laboras energie kaj zorgeme. Li inventis ses specojn de maŝin-instalaĵoj, kaj per tio pligrandigis la produkton. Laboristino Sung Ja-ĉin (宋維琴) en Antung-a Kaŭĉuko-fabriko (安東橡膠廠) produktas ĉiunmonate 2,500 parojn da kaŭĉukaj ŝuoj, 800 parojn pli multe ol

kiam ŝia infano ne estis sub la zorgo de la infanvartejo fondita per LAF Taŝing-ŝpinejo (大興紗廠) en Ŝekia-ĉuang (石家莊) de Hopej-provinco pliigis sian produkton de ŝpinaĵo je 11,174 funtoj kaj povas elŝpari 5,364 funtojn da kotono ĉiunmonate pro la kresko de laborfervoro kaj laborefiko de la laboristoj post la apliko de LAR. Ĉiuj ni ja povas citi nur kelkajn el la sen-nombraj ekzemplod.

Hodiaŭ la laboristoj pli klare kon-

scias, ke ili estas la veraj mastroj de sia patrolando, kaj ilia vivo ĉiam pli boniĝos, se ili produktas energie. Ili scias, ke ili devas batali sindone kontraŭ la Usonaj imperistoj kies agresado al Koreio rekte minacas iliajn revoluciajn fruktojn. Por garantii sufiĉan provizojon al la pacbatalantoj en Koreio kaj sukcese konstrui novan Ĉinion, fervora laborkonkursa fluso inundas la tutan landon. Ĝis aprilo jam pli ol 5,500 teamoj (2,232,000 personoj) akceptis la defion de la modela teamo de Ma Heng-ĉang (馬恆昌). Oni povas certigi, ke la nova laborentuzismo estigita de la publikigo kaj apliko de LAR tra la tuta Ĉina Popola Respubliko alportos fortan apogon ankaŭ al la antiagresiva kaj porpaca kampanjo.

Laŭlum



Laboristoj de Nordorienta Ĉinio en la laborista sanatorio.

la Popolo

Ŝansi-Provinco, okazis meznombro 5 ekspozicioj pomonate en lasta jaro. La 200 prelegojn patronatajn de la Buroo en kelkaj urboj aŭskultis pli ol 100,000 homoj, dum centoj da miloj plu aŭskultis la specialajn sciencajn brodkastojn el 28 radio-stacioj tra la tuta lando. Popularaj sciencaj rubrikaj nun aperas en 41 tagjurnaloj, inkluzive la Popolan Tagjurnalon en Pekino.

En urboj, laboro de la Buroo intime ligiĝas kun tiu de la sindikatoj. En libertempaj lernejoj por laboristoj nun starigis sciencaj kaj teknikaj kursoj. Laboristoj regule vizitas aliajn fabrikojn por studi produkt-procezojn. Ne malmultaj el la inventoj kaj raciigaj proponoj de laboristoj rezultigis el imagoj inspiritaj de tiuj vizitoj kaj la sciencaj ekspozicioj okazigitaj en fabrikoj. Aparte vasta intereso vekigis per la bele planita ekspozicio ĉe la Pekina Palaca Muzeo montranta la disvolvigon de socio el la historia materialisma vidpunkto.

Ankaŭ en la kamparoj la Buroo faras longdistancajn atakojn al profunde enradikigitaj superstitioj kaj feŭdaj kutimoj de penso per praktikaj demonstracioj de la valoro de sciencaj metodoj en produktado.

Milionoj da kamparanoj, katenitaj de la reakciaj registaroj de la pasinteco en malprogresema penso, ankoraŭ kredas, ekz., ke kiam eklipso estiĝas, la Ĉiela Hundo formangas la Sunon aŭ la Lunon. Kaj en vilaĝoj

ehas la batado de tamburoj kaj tantamoj por devigi la Hondon elgorgiĝi sian rabojn. Monatojn antaŭ la lasta eklipso, ĵurnaloj kaj prelegoj diskonigis la scion pri kio fakte okazos. Milionoj da kamparanoj supren rigardis al la ĉielo tiun tagon kun nova kompreno pri la universo. Pri tio ili facile kredas al la sciencistoj, ĉar tiuj sciencistoj jam montris al ili profitemajn sciencajn rimedojn de semo-selekto kaj insektoneniigo.

Popularigo de scienco estas neniel apartigebla de la defendo de la revolucio kaj la lando. Kiam Usonaj aeroplanoj invadis Nordorientan Ĉinion, geografiaj laborantoj faris mapojn montrante la intiman rilaton inter Koreio kaj Ĉinio. Fizikistoj popularigis la esperodonan scion pri atoma energio. La termino "atoma bombo" estas familiara al la popolo, el kiuj 200,000,000 jam subskribis la Stokholman Pac-alvokon. Ili jam lernis malami la atoman bombon kaj atom-manuilojn, sed ili ne ĝin timis, ĉar ĝi ne estas mistero al ili.

La laboro de la Buroo konstante plivastiĝas. En lasta aŭgusto fondiĝis nova filio, la Tut-Ĉinia Asocio por la Dissemado de Scienca kaj Teknika Scio. Monata Organo de la Buroo publikigas la planon por 1951: 2,000 prelegoj, 12 grandaj ekspozicioj, 100 popularaj sciencaj libroj kaj 500 prelegoj kun lumbildaj ilustraĵoj.

Censinio.

Nova Vivo

de la Almozuloj en Pekino

Almozopeto preskaŭ malaperis en la ĉefurbo, kie la Urba Registaro de Pekino donis novan vivon al 7,419 almozuloj de majo 1949 ĝis la fino de 1950. Tiu malnova problemo rezultanta el feŭdaj kondiĉoj kaj multaj jaroj da Kuomintang reaktia regado estas praktike traktata de la urba estraro.

Esploro de Pekinaj almozuloj montras ke ili ĝenerale povis esti klasifikitaj en tri kategoriojn. Unue, estis la "profesiaj" almozuloj, kies kutimo de almozopeto profunde enradikigis. Due, estis laboremaj kamparanoj kaj urbanoj kiuj estis mizerigitaj de bienuloj aŭ de Kuomintangaj oficistoj. Tria, estis fuĝintaj bienuloj kaj antaŭaj kuomintangaj soldatoj.

Tiuj, kiuj estas fortaj kaj sanaj, estis senditaj al la speciale organizitaj edukaj kursoj ĉe la Popola Instituto por Metio. Infanoj sub 16 jaroj estis senditaj al la lernejo funkcianta speciale por ili. La maljunuloj kaj invalidoj estis senditaj al la hejmo por maljunuloj.

Je la fino de 1950 al pli multe ol 5,000 almozuloj estis donita nova komenco en la vivo kaj povis esti kalkulitaj kiel bonaj civitanoj. El tiu ĉi nombro 2,914 estis helpitaj reveni al siaj naskiĝlokoj por labori aŭ kuniĝi al siaj familioj. Pli multe el la ceteraj prenis diversajn okupojn—laboro de digo-riparo ĉe la Flava Rivero (黃河), arbohakado en la Nordoriento, kaj plugado de virgatero en diversaj partoj de la lando.

Tuj post la alveno al la Instituto, multaj el ili estis tre maltrankvilaj. Ili timis ke ili estus malbone traktataj aŭ estus senditaj al labor-rotej.

Ĉar tion faris la japanoj kaj Kuomintang, kiam ili kolektis almozulojn. Unue kelkaj el ili ploris, kelkaj malbenis kaj insultis tiujn, kiuj provis ilin helpi. Tamen, la normala vivo iom post iom ilin trankviligas. La kutimo ellitiĝi frue, manĝi simple sed regule, ekzercadi kaj ripozi frue iom post iom donas al la almozpetintoj senton de sekureco. Tiuj, kiuj malsanas, ricevas kuracadon de la medicina fako de la Instituto.

Kiam ili akceptas la ideon de nova vivo, kultura, politika kaj metia kursoj estas donataj. La interŝanĝo de spertoj estas kuraĝigata. Ili ekkomprenas ke ili estis reduktitaj al stato de almozulo ne de la "kruela sorto," sed de la kruela malnova socio kaj reaktia regado, sub kiu ili iam vivis. La nobleco de laboro en la nova socio estas akcentita foje kaj refoje. La ideo, ke laboro estas honoro kaj ke ĉiuj, kiuj povas, devas labori, estas klarigata.

El la 2,337 ankoraŭ en la Instituto, la hejmo por maljunuloj kaj la lernejo por infanoj, 563 estas produktaj laboristoj. La ceteraj estas aŭ infanoj aŭ maljunuloj. La infanoj estas bone zorgataj kaj ilia estonta edukado estas garantiata. Por la maljunuloj kaj invalidoj, kiuj ne havas kapablon labori estas konvena loko por restado, sufiĉa nutraĵo kaj vestaĵo kaj aliaj necesaj provizataj.

La Instituto havas siajn proprajn presejojn, trikejon, ŝuofabrikojn kaj ĉi tie sin trejnans multe el la almozpetintoj. Krom tiuj ĉi tri fakoj, ankoraŭ pli ol 18 diversaj metioj kaj teknikoj estas malfermaj al ili. Tapiŝo-teksado estas unu el la multaj. En tia nova vivado multaj el la trejnatoj fariĝis jam spertuloj.

HOWENS



PATRIOTISMA KONKURSO

Sub la devizo: "Rezisti Usonon helpi Koreion protekti siajn hejmojn kaj defendi la patrion," la laboristoj de tuta Ĉinio sin jetas en grandskalan patriotisman konkurson de produkto.

De Nordorienta Ĉinio ĝis Hajnan-Insulo (海南島), de Ŝanhajo, Ĉingtaŭ (青島) ĝis Tihua (迪化) en Ŝankiang-Provinco, jam 2,065 fabrikoj kaj minejoj, ŝtataj kaj privataj, sin jetas en la movadon de produkta konkurso. Laŭ nekompleta statistiko, el 6 provincoj, 4 urboj kaj diversaj fervojoj jam 1,662,396 personoj partoprenis la konkurson. Sole en la Nordoriento, la konkurstantoj nombras 715,492 kaj 70% el la fervojoj laboristoj ĝin partoprenis.

Tiu ĉi patriotisma konkurso komenciĝis sur la bazo de plej altgrada patriota fervoro de grandnombraj laboristoj, kaj post la politika klerigado pri aktualaj situacioj. Multaj laboristoj elmetis la devizon: "Maŝino estas armilo kaj laborejo, la batalejo" kaj de la amaso mem levigis la tajdo de konkurso. La vateco de la movado estas senprecedenca. Partoprenas ne nur laboristoj, sed ankaŭ teknikistoj, oficistoj, medicinistoj, vartistoj, laborantoj de komunaj manĝejoj, kaj eĉ iliaj familianoj, ĉiuj aliĝas al la movado. Konkursas ne nur entreprenoj ŝtataj sed ankaŭ privataj, ne nur fabrikoj kaj minejoj sed ankaŭ financaj kaj komercaj organizoj kaj vendejoj kaj metiejoj. Multaj konkurstantaj unuoj ellaboris detalajn kondiĉojn por la konkurso laŭ la efektiva situacio de la respektivaj unuoj. Per tio la konkurso multe diferencas de la antaŭaj, kiam oni prenis entuziasman sloganon kiel praktikan programon de la konkurso.

En la konkurso la vasta laborista amaso montras siajn altajn entuziasmon kaj genion. Tial en la produktado, grandega sukceso estas akirita. Lastan jaron, pli ol 180 entreprenoj el la ŝtataj fabrikoj kaj minejoj finis plifruo aŭ superis la jarplanon de produkto, kaj aperis multaj novaj rekordoj. Pli grava estas la progreso de la konkordo inter la laboristoj kaj teknikistoj en la konkurso.

Tio interligis la laboron kaj teknikon kaj sekve multe instigis proponojn pri plibonigo de tekniko kaj raciigo de laboro. Dank' al tio la produktivo multe altiĝas. Ekzemple, en Mukdena Vestaĵo-Fabrika la produktivo kvarobliĝis pro la plibonigo de laborometodo fare de Kiang Van-ŝou (姜萬壽). En la Tria Mukdena Maŝinfabrika la teknikistoj kaj laboristoj kune elpensis sektoran premaparaton, kiu 239-obligas la laborefikon. Ĉou Paj-ĉen (周柏臣), teknikisto de la 3. Maja Fabrika, kune kun laboristoj, plibo-

nigante matricon por kupraĵoj, sparas ĉiumonate du tunojn da kupro. Teknikisto Li Kaŭ-tian (李高田), en Sukiatuan (蘇家屯) inventis tranĉmaŝinon kaj 80-oble altiĝas la laborefiko. En la Nordorienta Tria Maŝinparejo Vang Haj-lia (王海蓮) kaj Vang Ŝjue-po (王學溥) plibonigis laborilon kaj 20-oble altiĝas la laborefikon. La maŝinfabrikoj de la Nordoriento, lernante la metodon de rapida metaltrankado de Sovetunio, pli rapidigas la tranĉadon de duoble ĝis dekkelkoble. Ĉi tiu metodo kunigi laboradon kaj teknikon por plialtigi la produktivon montras klaran direkton al plua disvolvigo de estonta produkta konkurso.

En la konkurso aperis multe da sturmuloj kaj sturmtimoj por produktado. Ekzemple, en Mukdeno aperis 3,583 tiaj sturmuloj (inter ili 362 laboristinoj), 480 sturmaj teamoj, 71 sturmaj fakoj, sekcioj kaj subsekcioj. Inter la nordorientaj fervojistoj, kiuj staras sur la fronto de naciodefendo, malgraŭ bombado kaj enfilado de la Usonaj agresantoj, aperis multaj persistaj heroaj laborantoj kiel Li Ŝu-ĵou (李樹有), Vang King-pin (王靜彬 virino) k.a. Ĉi tiuj sturmuloj kaj sturmaj teamoj, prezentigas kiel modeloj por la vasta laborista amaso kaj fariĝas stabo de konkurso.

Kiam la laboreteamo gvidata de Ma Heng-ĉang (馬恆昌)* defiis la tutlandan laboristaron por la produkta konkurso, tuj venis granda nombro da respondoj. Ĝis la 21a de februaro, jam 1,383 unuoj akceptis ilian defion. Tia spontanea amasa movado de produkta konkurso sendube pli antaŭenpuŝos la patriotisman konkurson, firmigos la atingitajn rekordojn kaj fariĝos fundamenta formo de la konkurso kaj fundamenta metodo por organizi tian konkurson. Kaj tio certe garantias la konstantan firmaŝan antaŭenmarŝon de produkta konkurso.

Elĉinigi Nash.

* La laboreteamo de Ma Heng-ĉang estas modela produkta teamo de la 5a Maŝinfabrika en Nordorienta Ĉinio, kiu iniciatis landskalan kampanjon por pli granda efikeco en produktado.



Kuo Jun-ĉie, la prominenta modela laboristo, laboras en la minejo per Sovetia pneumatika borilo.

Feliĉo

Jaŭ Kin (姚錦)

Mi estas ĉefo de la meĥaniklabora sekcio de iu fervojo apud Jalu-Rivero. Tiun tagon mi iris al la relvojo por ekzameni la lokomotivon pripafitan de Usona aeroplano. Kiam mi palpis karesse la kuglotruojn sur la lokomotivo kaj la difektitan cilindron, mi ekvidis mian edzinon, Kim Tonghi, venanta al mi. Kio estus al ŝi? Ŝi estas ja la ĉeflegistino en la najbara fervoja hospitalo, sufiĉe okupata laŭkute kaj estas nefacile forlasi sian oficon.

"Ĉu io okazas al la alportita vundito?" demandis mi, kiam ŝi estis alproksimiĝanta. Antaŭ kelkaj tagoj ni transportis al la hospitalo iun kamaradon, kiu vundiĝis sub la pafado de Usona aeroplano.

Kapneante, ŝi transdonis al mi nove trikitan lanveston kaj turnis sin kun scivolema rigardo al la densaj kuglotruoj. Ŝi diris:

"Panjo skribis el Seulo, ke Usonaj aeroplanoj ĉie bombadas!"

Mi rigardis ŝin. Ŝia mieno restis tute trankvila. Mia edzino parolas la ĉinan lingvon pli flue ol mi parolas la korean. Tio estas komprenebla. Ĉar ŝi, kvankam estis naskita sur la alia bordo de Jalu-Rivero, tamen sur tiu ĉi bordo—sur la ĉina tero plenkreskis.

Mi ĉiam imagis, ke ni similas al du arboj, pomarbo kaj ulmo, kiuj kreskis sur diferencaj

teroj sed iu potenca mano kunligis iliajn trunkojn kaj branĉojn. Tiamaniere la revolucio nin kunigis. Ĉar identas niaj kredoj, ni geedziĝis antaŭ jam dek jaroj.

"Kiel vi povas esti libera hodiaŭ?" demandis mi vidante ke ŝi enpensigas palpante la kuglotruojn. Ŝi nur ridetis al mi kaj reprenis la lanveston. "Mi atendas vin en la dormejo, mi volas ion paroli kun vi," diris ŝi forirante.

Min adiaŭante kun rerigardo, ŝi forlasis la relojn kaj iris trans la turnplaton.

La posttagmeza sunlumo karesas ĉion sur la meĥaniklabora sekcio en atmosfero de paca konstruado. Ĝi prilumis la relvojn, la karbotenejon, la akvoturon, la alte starantaj kamertubojn, la ladtegmenton de la remizo, la laboristan ripozejon el ruĝaj brikoj kaj samtempe ankaŭ la difektitan lokomotivon antaŭ la okuloj.

"Ĉion ni ĵus ellernis administri, ĉio komencas iri regule, kaj feliĉaj tagoj estas komenciĝantaj—ne, kiel ni povus permesi fremdulojn malordigi nian pacan vivon!" Ordiginte la instrumentojn mi reiris al la laborejo tiel meditante.

Ĉiuj laboristoj de la sekcio estis okupataj, ĉar tie disvolviĝis patriotisma produkto-konkursado por protesti kontraŭ la krimago de la Usonaj aeroplanoj. Jam noktigiĝis kiam mi reiris al la dormejo. Puŝmalfermante la pordon de la ĉam-

bro mi vidis, ke Tonghi sidas ĉe la lampulmo flikante ĉifonan veston de la infano. La lampo prilumis ŝian malstreĉitan hartufon. Mi lavis al mi la vizaĝon kaj sidiĝis kontraŭ ŝi.

"La lanvesto bone konvenas al mi," diris mi tiritante la ĵus surmetitan trikoton. Ŝi jetis al mi rigardon, formetis la kudrilaron, frapetis la vatitan jaketon de infano kaj jetis ĝin sur la kapusenon dirante: "La vetero malvarmigiĝas. Portu ĝin al Ljonĉjo kiam vi foriros."

Ljonĉjo havaŝ jam ok jarojn. Ĉiuj de la sekcio nomas lin "frukto de internaciismo." Ĝe la memoro de ŝia juna frato Kim Ljongku, kiu mortis sub obuso de tranĉebombardilo de japanaj diablidoj, ni nomis la infanon Ljonĉjo.

Mi elverŝis varman akvon kaj etendis unu tason al ŝi. Ŝi prenis la tason kaj rigardis al mi.

"Pri kio vi volas paroli kun mi?" mi demandis ŝin. Ŝi longe ne respondis.

"Pri kio?...?" redemandis mi. Ŝi trinkis malrapide.

"Ĉiuj deziras vivi bonan kaj feliĉan vivon, sed—" diris ŝi rigardante al mi. "Sed kiu perdas la senton de respondeco al la vivo de aliaj, tiu ne povas esti feliĉa."

Kiam la vivo pasis de tumultaj jaroj de milito al kvietaj periodo de konstruado kaj la cirkonstanco de niaj vivo kaj laboro ĉiutage plisekurigis, Tonghi ofte esprimis al mi tiun ĉi opinion. Dum la lastaj jaroj ĉio iris sur regula vojo. Laŭ la eksteraj oni jam povas vidi la sekurecon de nia vivo. En la sinteno de Tonghi troviĝas pli da trankvileco. Mia verto kalvigis kaj mia korpo dikiĝis. Ni sendis Ljonĉjon en lernejon. En libertago ni iras kune por konduki Ljonĉjon hejmen, aĉetas ion en la najbara vendplaco aŭ promenadas apud Jalu-Rivero. Ni ambaŭ laboras trankvile kaj amas multe nian laboron. La vivo estas feliĉa....

"Kial vi pensas denove pri tio?" demandis mi.

"Dum ĉi tiuj tagoj mi ĉiam tiel pensas." Ŝi aldonis iom maltrankvile: "Mi ĉiam deziras diri al vi—" Ŝi movis sin pli antaŭen kaj daŭrigis post paŭzeto: "Mi tre volas reiri al mia patrolando."

Mi eltrinkis nur duone la akvon kaj ekĉesis trinki je tio. Mi jetis rigardon al ŝi kaj ne povis paroli dum momento... Tonghi, mia edzino, volas forlasi min kaj la infanon kaj iri al sia patrolando?... Tiu parolo estigis subitan malordon en mia penso kvazaŭ oni ĵetus ŝtonon en kvietan akvon.

"Vi jam decidis?" mi ekdiris kun malbonhumora tono.

Ŝi rigardis min fikse kaj kapjesis. "Mi...ne konsentas," diris mi pretervole post longa silento. Mi metis la tason sur la tablon kaj rigardis al ŝi.

Ŝi malfermegis la okulojn, en kiuj reflektiĝis la doloro de interna konflikto. Mi ekrimarkis, ke ŝia vizaĝo estas tiel malgrasa, la mentono pintiĝas kaj la buŝo grandigiĝas.

"Ki-o? Vi ne konsentas?" Ŝi rigardis min malkontente kaj dolore, ripetante mian parolon. Aldonis ŝi mallalte: "Vi ne povas ne konsenti. Tio ne estas via parolo. Mi scias, mi scias—vi ne volas, ke ni disigu... Tiel vivi kune, en tia tempo, ĉu estas por vi trankvile? Kaj feliĉe?"

Mi gratis mian kapon ĉagrenite. Fakte, ankaŭ mi aŭdis, ke multe da koreaj kamaradoj reiris al sia patrolando por partopreni en la defendbatalo, sed mi neniam paŭzis por bone konsideri pri mia propra edzino. Mi opiniis—ĉu ŝi ne laboras multe kaj bone ĉi tie? Ĉu ne estas ankaŭ tre grava la laboro en la fervoja hospitalo?... Cetere, kiel tio estus ebla, ke la ĵus trankviliĝinta vivo refalu en malordon? Ĉu estas necese? Mi paŝis tra la ĉambro tien kaj reen kelkfoje, haltigis mian rigardon sur la malnova vatita jaketo de la infano kaj diris denove malgraŭvole:

"Kaj la infano?..."

Tordante angulon de sia poŝtuko, Tonghi eklevis la kapon por min rigardi, kaj poste denove kliniĝis kaj ne plu parolis.

La lampulmo jetis trankvile ŝian ombbron sur la muron. La fenestro kraketis en la nokta vento. Mi subpremiĝis sub la pezo de ŝia silento. Subite mi konfuziĝis, kvazaŭ iu inseteto rampus sencele en mia koro. Mi spertis profundan memproĉon kaj doloron.



Gardo ĉe Jalu-Rivero

Ĉina akvarelo de Ĉiang Ĉaŭ-ho



NOVA skriba sistemo per latinaj literoj estas enkondukita por Ji-nacio (彝族), unu el la minoritatoj de Ĉinio. Tiu ĉi nacio loĝas en la montregionoj de Sikang-Provinco (西康省) en Sudokcidenta Ĉinio. Ilia kulturo estas ankoraŭ tre primitiva. Skriban lingvon ili apenaŭ posedis. Nur bimoj (la sorĉistoj de Ji-nacio) scipovis la malnovan skribon, kiu ankoraŭ ne havas fiksan formon, nek fiksan regulojn. Tio entute nebligas la vastan klerigadon por Ji-nacio. Post la liberigo, pro la ricevo de politika rajto kaj altiĝo de vivonivelo, klerigado estas urĝe bezonata, sekve la reformo de ilia skriba lingvo fariĝas aktuala. Por bone solvi tiun ĉi problemon la Bonvola Misio de la Centra Popola Registaro, kiu vizitis la sudokcidentajn fratajn naciojn, la loka aŭtoritato kaj la intelektuloj de Ji-nacio post kvarmonata klopodado fine kreis novan skriban sistemon per latinaj literoj por Ji-nacio. La eksperimento pravas, ke la sistemo tre taŭgas por la parola lingvo kaj ĝi estas varme akceptita de la popolo.

LA agrara reformo sude de la Jangze-Rivero (揚子江) donis ankaŭ al la poetoj kaj muzikistoj en Ŝanhajo riĉan rikolton. Laborinte en la agrarreforma taĉmento ili kreis grandan muzikan verkon por la agrara reformo. La tuta kompozicio konsistas el naŭ pecoj: 1) Uverturo; 2) Agrara Reformo Venas al Ĉiuj Vilaĝoj; 3) Plendo pri la Mizero; 4) Bienulaĉoj antaŭ la Kamparana Tribunalo; 5) Klasdiferencigo; 6) Jango de Kampodivido; 7) Dialogo de Milicano; 8) Soleno por la Sukceso; 9) Konkursoj en Produktado. La tuta kompozicio estas verkita laŭ stilo de la popolkantoj sude de la Jangze-Rivero. La verkadon partoprenis la poetoj kaj muzikistoj Ĵen Kĵun (任鈞) Liaŭ Ji-ming (廖一明) k.a.

LA riĉaj verkoj de Lu Sin (魯迅) estas la plej altvalora kultura riĉaĵo de ĉina popolo. La tuta laboro en lia tridekjara verkista vivo sumiĝas almenaŭ 10,000,000 vortoj. Depost kiam s-rino Lu Sin fordonis la tutan eldonan rajton al la Centra Popola Registaro en lasta jaro, la Centra Eldona Administracio tuj invitis Feng Ŝĵue-feng (馮雪峯), faman literaturiston, Sun Jung (孫用) pioniron de Esperanto-movado kaj malnovan konaton de Lu Sin, Vang Ŝih-king (王士菁), la verkinton de "Biografio de Lu Sin" kaj aliajn kompetentulojn rekompili la tutan

verkon kaj zorge korekti la preserarojn el ĝi. Laŭ la plano ankaŭ necesaj komentarioj estas farotaj. Oni esperas, ke la nova kaj kompieta eldono de La Verkaro de Lu Sin eldoniĝos en 1952.

ASINTA monato estis monato de ekspozicio de navaj filmoj en Ĉinio. Ekde la 8-a, la internacia virina festo, komenciĝis en ĉiuj urboj tra la tuta lando la ekspozicio. Ĝin partoprenis ĉiuj grandaj kinejoj. Ili projekciis ĉiutage unu novan filmon. Entute estis 26 novaj filmoj projekciitaj, el kiuj 19 estas rakont-filmoj, 1 eduka kaj 6 dokumentaj. El tiuj filmoj oni povas klare vidi kiel la instruoj pri arto kaj literaturo de prezidanto Maŭ Ze-tung efektiviĝis en la kreo de filmarto. Ili montris la vivon, pensojn, entuziasmon, lukton kaj konstruadon de la laboranta popolamaso. Same ili ankaŭ montris la transformiĝon de la malnova Ĉinio al la nova kaj la brilan perspektivon de la popoldemokratia Ĉinio.

JE la 26a de lasta monato en Pekina Hotelo okazis poezia kaj muzika vespero iniciatita de la Buroo de Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj. La tuta programo konsistis el 20 kompozicioj, 10 poemoj kaj ili estis entute el la popoldemokratiaj landoj. La

du unuaj estis "Kanto de Stalin," kaj "Himno de Stalin." Poste sekvis la belaj muzikaj verkoj kaj popularaj poemoj de la popoldemokratiaj landoj: Bulgario, Rumanio, Hungario, Koreio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Mongolio, Germana Demokratia Respubliko kaj Vietnamo. Kiel diris Hung Ŝen (洪深), la estro de la Buroo de Kulturaj Rilatoj kun Eksterlandoj, ili estas la plej belaj sonoj de la homaro kaj bone esprimas la senton de la tutmondaj popoloj, kiuj tiel amas la pacon kaj iliajn gvidantojn kaj tiel indignas pri la militinstigantoj kaj firmo kredas je la pachtalo.

KOMPANANTE la altiĝon de la vivnivelo de la kamparanoj ekkreskas nun en Ŝantung-Provinco (山東省) multaj vilaĝaj biblioteketoj. Nun la tuta nombro jam proksimiĝas al 400. Kaj kie troviĝas tia biblioteketo, tie komenciĝas amasa klerigado. Tiaj biblioteketoj ne nur helpas la lernadon de la kamparanoj sed ankaŭ altiĝas ilian klaskoncion kaj produktadon. La kamparanoj arde amas tiajn biblioteketojn. Ili tien iras, tuj kiam ili trovas liberton. Eĉ la analfabetoj iras kaj petas la legpovantajn legi por ili. Por aĉeti de legajoj oni ne plu trovas malfacilojn. Multaj el la kamparanoj volonte oferas monon kaj kelktempe eĉ librojn por la biblioteketoj.

Fi, al la Hipokrituloj

Estis al mi granda ĝojo konstati, ke ni homoj de la Okcidento kaj de la Oriento tre bone povas interkompreniĝi, kiam temas pri la laboro por la paco. Mi eĉ volas diri, ke la vojo al vi, pacamikoj en la Oriento, estas multe pli mallonga ol la vojo al miaj samlandanoj, kiuj neas labori por nia komuna afero.

Mi tre ĝojas pri la venkoj de la popoloj en Koreio kaj de viaj volontuloj! Sed kompatinda la popolo de Koreio: Mia edzino kaj mi ĉiam kordoloras, kiam ni nur pensas pri tio. Kaj tiajn kruelaĵojn faras estaĵoj, kiuj laŭ sia buŝo kredas je la kristana religio, la religio de la amo! Fi, kia abomena blasfemo: Persone mi ne estas ateisto, kaj pro tio mi povas diri, ke neniu povas pli abomena blasfemi la kristanan religion kaj Dion, ol tiu hipokrita bandito Truman kaj liaj kunkrimuloj! Kaj ni popoloj de Eŭropo devas hontegi pro niaj registaroj, kiuj helpas kaj servas al tiaj amasmurdistoj! Sed espereble la homoj, kvankam malrapide, iom post iom malfermas la okulojn. Ankaŭ ĉi tie en Svedio.

Tutkore vin salutas,

G. Nilsson
Svedio

Usonaj Imperiistoj—La Komunaj Malamikoj de Nesklavemaj Popoloj

Al miaj bonaj kamaradoj en Ĉinio, al la triumfantaj Volontuloj de Ĉinio, al vi, kiujn mi admiras en Danlando kaj dankas pro via kuraĝo en via grandega batalo. Ni komunistoj, ĉi tie en Eŭropo sekvas kun dankemo vian batalon kontraŭ Usona imperiismo kaj tiun de la korea popolo. Kaj ni kredas, ke la venko apartenos certe al vi kaj Koreio.

Mia edzino kaj mi vidis ĵus la ĉinajn filmojn "Trans la Janze-Rivero" kaj dokumentan filmon pri korea fronto, en kiu mi vidis la mortintajn virinojn kaj geknabojn.—Kiom mi ĝojas pro la malvenko de la Usonaj imperiistoj.

Mi salutas vian popolon. For el Azio, la Usonaj imperiistoj! Ni helpos vin en via batalo por liberaj Ĉinio kaj Koreio. La samaj imperiistoj estas ankaŭ niaj malamikoj. Ili estas ankaŭ en nia lando...Kredu, la saman liberigan batalon ankaŭ ni havos.

Saluton de via dana socialista kamarado,
H. V. Bindner
Danlando.

Ĉio en Francio Estas Forrabla de Usonaj Kolonigantoj

Karaj kamaradoj,

Mi multe vin dankas pro la sendo de via belega ĵurnalo kiu interesas min. Certe la franca popolo luktas por la paco, sed tiu lukto estas malfacila, ĉar Francio estas nun vera faŝista lando, Mi hontas pri tio. Mia urbo (Bordo) nun fariĝas pli kaj pli Usona milithaveno. La Usonaj soldatoj loĝas ĉe ni. Ili okupas niajn plej belajn hotelojn, dume al la francoj mankas loĝejoj. Ili prenas eĉ niajn lernejojn por iliaj gefiloj. Ili komandas niajn policistojn. Kia honto!

Baldaŭ al Parizo venos naziaj generaloj, sed mi kredas, ke la pariza popolo ne ilin akceptos.

Mi estus tre ĝoja se vi sendus al mi belan foton de Maŭ Ze-tung. Vivu la glora ĉina popolo!

Helpu forte la viglajn koreajn fratojn! Elĵetu la Usonajn krimulojn!

Mi sendas al vi ĉiujn mian fratan saluton:

Baldaŭ kune ni venkos.

R. Faraill
Francio



PAGU AL NIAJ PERANTOJ

- Aŭstralio:** Steve Bennett, Flat 3, 62 Brighton Av., Croydon Park, N. S. W.
- Belgio:** Tousseijn Camille, 35 Statiestraat, Jabbeke (W. VL) (Jarabono: 50 bfr.)
Walraevens Rajmundo, Rabelais Strato, 10 Bruselo.
- Britlando:** Collet's Subscription Department, 40 Great Russell Street, London, W. C. 1. (Jarabono 6 ang. ŝil.)
- Ĉeĥoslovakio:** Slovaka Esperanto-Instituto, T. S. Martin, Kuzmany-str. 29. CSR-Slovakio. (jarabono 50 kĉs.)
Burda Rudolf, Plzen-palackeho N. 6,
- Finnlando:** Niilo Kavenius, Niklaksenkatu 10/14 Turku. (Jarabono: 300 Fmk.)
- Francio:** Labor-Esperantista Federacio, 34, Str. Chabrol—PARIS—X. (CCP. Paris 902-52) (Jarabono: Fr. Fr. 450)
- Germanio:** Arthur Schulze, Berlin-Lübars, Kolonie, Waldesrieden 77. (Jarabono: 6 D.M.)
Erich Rödel, Leipzig. W. 33, Becherstr. 10.
- Hungario:** IBUSZ, Budapest, V. Akademia u. 10. (Jarabono 20 forintoj)
- Italio:** Itala Laborista Esperanto-Asocio, Via Modena 33—Torino. (Jarabono: 400 liroj)
- Izraelio:** Bencion H. Danon, Kibuc Afikim. (Jarabono: 400 prutoj)
- Norvegio:** Norvega Esperantisto, Redakcjono, Boks 942, Oslo. (Jarabono 6 kronoj)
- Pollando:** Isaj Dratwer,—Asocio de Esperantistoj en Pollando Warszawa Marszalkowska 81/32 (Poŝtĉeka konto P.K.O. I 8266/115) (Jarabono 12 zl.)
- Rumanio:** Rumana Esperantista Societo, București I, Bulev. 6 Martie 15, et. I. (Jarabono: 120 leoj)
- Svedio:** Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. (Jarabono 6.50 kronoj)

Rim.

- 1) Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas regule ricevi nian gazeton, pagu laŭ la supra tarifo.
- 2) Legantoj en ceteraj landoj povas aboni nian gazeton ankaŭ ĉe iu el la supraj perantoj al kiu li trovas rimedon pagi aŭ rekte ĉe nia administracio per internaciaj respond-kuponoj (1 respond-kupono por ĉiu ekzemplero) aŭ samvaloraj novaj esperantaj libroj, sed de individuaj legantoj ni ne akceptas gazetojn.
- 3) Korospondan anoncon ni ne akceptas pro manko de spaco.

國內定價：每册基價一元五角。全年十二期基價十八元。平寄郵費在內。掛號另加。